



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Februraro 2016 n-ro: 2

Saluton denove karaj geamikoj!

Ĉi tiu estas la dua numero de nia revueto. Ni esperas, ke vi ŝatis la unuan tamen, ke ĝi estis tre amatora kaj simpla revueto. Bonvolu skribi al ni ĉion, kion vi pensas pri nia revueto. Vi povas skribi ankaŭ en turka lingvo, tute ne gravas. La revueto estas nia, do ĝi ankaŭ estas via. Vi esprimu vian opinion pri ĝi ĉar ni volas plibonigi ĝin per viaj opinioj kaj sugestoj. Certe ke ĉion, kion vi volas ni ne povos realigi, sed ni aperigos viajn opiniojn en nia revueto.

Pasintfoje ni diris ke ni pripensas enmeti kelkajn dulingvajn artikolojn. Do ĉi tiun salut-artikolon ni ankaŭ tradukis kaj metos en turka lingvo dekstren.

Nia revueto ni sendas al vi per google ret-poŝt-grupo, sed ĝin ankaŭ povas trovi en nia nova retejo sub la menuo "Revueto" de kie vi povas elŝuti ĝin. Sed ni volas, ke vi kaj viaj geamikoj, kiuj interesas pri lingvo Esperanto, abonon al nia revueto, do tiel ni scios kiom da abonantoj ni havos. Ni nur bezonas vian ret-poŝt-adreson por tio, kiun vi povas sendi al la jena ret-poŝt-adreso aŭ al nia facebook-grupo.

Bonan legadon al ĉiuj! ■

Tekrar merhaba değerli arkadaşlar!



Bu dergimizin ikinci sayısı. Her ne kadar da amatör ve basit bir dergi idiyse de umarız birinci sayımızı beğenmişsinizdir. Lütfen dergimiz hakkında düşündüğünüz herşeyi bize yazın. Türkçe dilinme yazın, hiç önemli değil. Dergi hepimizin. Dergi hakkında fikrinizi

ifade edin çünkü biz de sizin fikir ve önerilerinizle dergiyi iyileştirmek istiyoruz. Tabi ki her istediğinizi gerçekleştiremeyiz ama fikirlerinize dergimizde yer vereceğiz.

Geçen sefer birkaç makaleyi çift dilli olarak koymayı düşündüğümüzü söylemiştik. Dolayısı ile bu selamlama yazısını da çevirip Türkçe olarak sayfanın bu tarafına koyduk.

Dergimizi size google e-posta grubu ile dağıtıyoruz, ama ayrıca onu yeni web sayfamızın "Dergi" menüsü altında da bulabilir ve indirebilirsiniz. Ancak sizin ve Esperanto dili ile ilgilenen arkadaşlarınızın bize abone olmalarını istiyoruz ki kaç abonemiz olduğunu bilelim. Tek ihtiyacımız olan e-posta adresiniz ve onu da aşağıdaki e-posta adresine veya facebook grubumuza gönderebilirsiniz.

Hepinize iyi okumalar! ■

<https://esperantoturkiye.wordpress.com/category/dergi-revueto/>
vasilkadifeli@gmail.com
<https://web.facebook.com/groups/7121509722/>



TURKA STELO


Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Kursoj



Kurso por komencantoj en Kadıköy distrikto.

La kurso daŭras sukcese. Nia lernantino Fatma Eroğlu kandidatiĝis kaj elektiĝis kiel reprezentantino de TEJO en la Eŭropa Parlamento do en Majo ŝi vojaĝos al Bruselo kaj reprezentos TEJO-n kaj ankaŭ ni en la Eŭropa Parlamento. Nova amiko Ege Madra aliĝis al nia kurso.

Kurso por komencantoj en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul

La kurso de Murat Özdzidar en la lernejo daŭras sukcese.

Kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato en Manisa urbo

Alian kurson gvidas Utku Gürdal en Celal Bayar universitato en Manisa. La kurso havis preskaŭ 16 gestudentoj en la komenco sed nun lernas nur 5 gestudentoj ĉefe de matematika fako kie Utku instruas. La kurso daŭras sukcese.

En ĉiuj kursoj ni sekvas la lernolibron de Stano Marĉek "Esperanto per Rekta Metodo". Tiu fama libro, kiu jam estas tradukita al pli ol 35 lingvoj, ankaŭ aĉeteblas en turka lingvo. ■

Nia nova retpaĝo



La turka esperantistaro nun havas novan retpaĝon!

La ligilo de la retpaĝo estas la jena :

<https://esperantoturkiye.wordpress.com>

En la retpaĝo ni aperigas mallongajn dulingvajn blogaĵojn kaj la ĉefa celo estas allogi la turkajn neesperantistojn kaj afiŝi informojn pri Esperanto por ĉiuj. En la retpaĝo ankaŭ troviĝas la malnovaj numeroj de nia revueto "Turka Stelo" sub menuo "Dergi/Revueto" de kie oni povas elŝuti ilin.

Vi povas aboni al nia retpaĝo per via retpoŝt-adreso por esti sciigita pri novaj blogaĵoj. Por tio bonvolu iru suben en la dekstra menuo.

Türk esperantistlerinin şimdi yeni bir web sayfası var!

Sayfanın bağlantısı :

<https://esperantoturkiye.wordpress.com>

Sayfada kısa ve iki dilli blog yazıları görüntülüyoruz. Ana amaç esperantist olmayan Türklerin dikkatini çekmek ve herkes için Esperanto hakkında bilgiler vermek. Sayfada ayrıca "Dergi/Revueto" menüsü altında dergimiz "Turka Stelo"nun indirilebilmesi için eski sayıları bulunmaktadır.

Yeni blog yazıları hakkına bilgilendirilmek için sayfaya e-postanız ile abone de olabilirsiniz. Bunun için lütfen sağ menünün alt kısmına bakınız.

Esperanto-Sumoo



Rezulto de la novembra Esperanto-Sumoo

En la novembra Esperanto-Sumoo

partoprenis 265 legantoj el 29 landoj. Perfektaj venkintoj (15 venkoj) estis 216/265 (81,5%). Kvanto de legitaj paĝoj estis pli ol 18,000 paĝoj. Do, averaĝe unu homo legas 70 paĝojn dum 15 tagoj de la Sumoo.

La nombro de la partoprenantoj estis la plej granda en nia historio dank'al la grupo de Koreanoj kaj propagando en diversaj E-aranĝoj.

El Turkujo partoprenis du legantoj kaj ambaŭ venkis ĉiuj 15 tagoj kaj ili gajnis diplomon.

Nun ni havas novan facebook grupon kie Esperanto-Sumoo partoprenantoj kaj interesantoj povas kunveni kaj diskuti pri la Sumoo kaj paroli pri la libroj ili legas:

La unua Esperanto-Sumoo de la nova jaro okazis inter la 10-a kaj 24-a de januaro 2016. Sed la statistikojn Hori Jasuo ankoraŭ ne anoncis.

<https://web.facebook.com/pr ofile.php?id=759066970888217>

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

UEA



N-ro 599 (2015-12-07) UEA invitas prelegi en la IKU-sesio en Nitro

Kadre de la 101-a UK en Nitro okazos la 69-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn pri prelegoj al la sekretario de IKU rete (amri@huji.ac.il) aŭ paperpoŝte: prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-7179901 Modiin, Israelo.

N-ro 599 (2015-12-07)

Elektioj en UEA komenciĝas

En 2016 okazos elekto de novaj gvidorganoj de UEA por la periodo 2016-2019. Parto de ĝi estos elekto de komitatoj B por reprezenti la individuajn membrojn (IM) en la Komitato de UEA. Laŭ la Statuto (art. 24) oni elektas unu komitatanon B por ĉiu komencita milo da IM. Laŭ la antaŭvidata nombro de IM oni elektos ses komitatojn B.

N-ro 600 (2015-12-29)

UEA invitas volontulojn

Iĝu plentempa volontulo en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Esti volontulo signifas ne nur grave kontribui al la Esperanto-movado, sed estas samtempe persona pliriĉiĝo. La volontuloj laboras en la koro de la Esperanto-movado – la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO, povas kunlabori pri tre interesaj projektoj, partoprenadi aranĝojn kaj kunlabori en la tutmonda medio.

http://uea.org/aktuale/komun_ikoj

TEJO



N-ro 419 (2015-12-11) Mounir Abjiou: la nova oficisto

Danke al administra subvencio de Eŭropa Unio, TEJO ĉi-jare denove havis la eblon dungti plentempan oficiston. Por la posteno kandidatiĝis ok homoj, inter ili sep viraj kaj unu ina. Post skajpaj intervjuoj kun la kandidatoj la Estraro decidis elekti la 23-jaraĝan marokan esperantiston Mounir Abjiou, jam konatan en la junulara movado pro la kelksemajn volontuladon en la Centra Oficejo de UEA. Legu pli detalajn informojn ĉe: <http://tejo.org/2015/12/mounir-abjiou/>.

N-ro 419 (2015-12-11)

Konkurso: Partoprenu en la 72-a IJK en Pollando!

Ĉu vi ŝatus partopreni al la 72-a IJK okazonta venontsomere en Vroclavo, Pollando, sed ne disponas la financajn rimedojn? Jam tradicie la fonduso pretas helpi al la individuaj membroj de TEJO partopreni la kongreson, kovrante ĝis 80 elcentojn de la vojaĝkostoj, loĝadon en la plej malmultekosta kategorio kaj la programkotizon. Por aliĝi kaj informiĝi pli detale legu la alvokon ĉe:

<http://tejo.org/2015/12/konkurso-partoprenu-en-la-72-a-ijk-en-pollando/>

<http://uea.org/aktuale/tejo>
<http://tejo.org/>

Nasıl Esperanto Öğrenebilirim?



Esperanto'ya ilgi duyuyorsunuz, merak ediyorsunuz, öğrenmek istiyorsunuz ama cesaret edemiyorsunuz ve de uzaktan izliyorsunuz!

Size bazı tavsiyeler vereceğim ama herşeyden önce şunu belirteyim : dil öğrenmek kolay değil, herkesin farklı kabiliyeti var bu konuda, bazıları çok hızlı öğrenir bazıları çok zorlanır. Ben mesela zamanında ortaokul ve lise'de 6 sene boyunca haftada 4-5 saat İngilizce dersi aldım ama üniversitede yeni baştan bir sene hazırlık okumak zorunda kaldım ki İngilizce puanım o zaman için çok yüksek idi.

Ancak Esperanto'nun diğer diller gibi olmadığını da duymuşsunuzdur. Evet herkes farklı oranlar belirtiyor 1'e 3, 1'e 10 gibi ama gerçekten de Esperanto diğer dillere göre öğrenilmesi çok kolay bir lisan. Aslında başlangıçta çok yüksek bir ivme ile öğrenilir Esperanto ve hemen hemen bir ay içerisinde konuşmaya da başlar kişi. Benim zamanımda okulda 6 senede öğrendiğim İngilizce seviyesine Esperanto'da 1-2 ayda gelinebiliyor. Bu aşama Avrupa Standartlarına göre A2 ile B1 arasında bir seviyedir.

Ancak sonrasında dili mükemmeleştirmek için diğer dillerde olduğu gibi bolca kitap okumak ve sürekli yazı yazmak gerekir. Esperanto yapısı ile bu aşamada da kişiye kolaylıklar sağlar. Gene de dilinizi mükemmelleştirmek uzun bir süre gerektirir. Kişi B1, B2, C1 ve en son C2 seviyelerine ancak sürekli kitap okuyarak ve yazı yazarak gelebilir. Başkaları ile yazışmak da bir çözümdür.

Mükemmelleştirme kısmını bir kenara bırakalım ve o ilk aşamayı konuşalım. Çoğu kişi için bu ilk aşama çok önemlidir ve dili öğrenmenin korkulan kısmı da budur. Sonrası çorap sökücü gibi gider ya da gitmez, belli olmaz. Herşeyden önce ülkemiz binlerce yabancı dil kursunun bulunduğu bir cennet, ya da cehennemdir diyelim. Tam bir enkaz. İnsanlar kursa yazılır, giderler, ama kursa giderken evde çalışmazlar, yapılan dersi tekrarlamaz ve bu şekilde istenilen sonuca ulaşmaktan yavaş yavaş kişi uzaklaşır. Az zaman sonra kursa gitmek, hele ki İstanbul şartlarında, insana çok zor gelir, bazı günler kişi gitmek istemez ve sonuçta kursu asmaya başlar halbuki para da ödüyordür. Çoğu kişi almakta olduğu kuru bırakır bazıları bitirir ama sonraki kura kayıtlarını yapmazlar vs.

Demek istediğim herşeyden önce kendinize ben bu dili öğreneceğim demeniz lazım. Günde 4 saat "akıllı" dediğimiz telefonlar elimizde bir o yana bir bu yana Internet'e bakar dururuz. Bunun bir saatini bu işe ayırsak herşey çok kolay hallolacaktır. Zaman yönetimi denen olay bizim insanlarımızda yok maalesef. Bunu uygulamalıyız. Bu sadece Esperanto öğrenmek için değil her şey için geçerlidir ve en güzel tarafı da bu tamamen bizim elimizdedir. Kayıp geçen zaman hayatımızdan kaybettiğimiz bir süredir.

Başka bir yabancı dil bilenler şanslıdırlar çünkü Esperanto öğrenmede o dil çok yardımcı olur, süreyi belki de yarı yarıya indirir. İngilizce bilmek Almanca öğrenmede çok da fazla yardımcı olmayabilir, ama İngilizce olsun, Almanca olsun, Fransızca olsun biliyorsanız, bu Esperanto öğreniminde size çok yararlı olacaktır. Öte yandan küçükken önce Esperanto öğrenen birisinin de diğer dilleri öğrenmesi daha kolay olduğu Manchester Üniversitesinde yapılan deneylerle sabittir.

Gelelim Esperanto öğrenmeye:

1) İngilizce bilenler Duolingo'da bu sene içerisinde açılan Esperanto kursunu deneyebilirler. "Akıllı" telefonu olanlar zaten bunu tercih ediyor genelde.

2) www.lernu.net sayfasına kayıt olup öğrenebilirsiniz. Çok dilli bir sayfadır ve pek iyi olmasa da Türkçe önyüzü de vardır bu sayfanın. Ayrıca bu sayfada yazışacak bir çok arkadaş da edinebilirsiniz.

3) Facebook'taki ESPERANTO TÜRKİYE grubuna kayıt olup sadece Türkler için açtığımız kapalı Dil Kursu grubuna da kayıt olabilirsiniz. Orada çok iyi bir Esperanto kitabı var. Kitabı pdf olarak indirip bir copy center'da 15 TL'ye bastırıp ciltletebilirsiniz. Gerçi kitap İngilizce'den öğretiyor ancak sözlük kısmı dışında bunun hiç bir önemi yok çünkü kitap doğrudan bir öğretim metodu kullanıyor ve normalde bir öğretmene de gerek olmuyor.

Ancak kişinin her zaman kafasında soruları oluşabilir bunu aşmak için de size bir öğretmenin anlatacağı şeyleri Kitaba paralel olarak hazırladığımız ve Ders Notları adını verdiğimiz bir word dosyasına koyduk, onu da indirip bir copy center'da bastırabilirsiniz. Kitapta 22 ders var her birine 2 saat harcasanız 44 saatte bahsettiğim o ilk aşamaya gelir, konuşmaya başlayabilirsiniz.

Benim tavsiye ettiğim bu 3. yöntemdir sadece zamanınızı programlamak ve kararlılığınız ortaya koymak yeterlidir. İngilizce bilen birisi için bu süre daha da kısa olabilir, dil öğrenmekte zorluk çeken birisi için bu süre daha da artabilir.

Şimdilik bu kadar kararınızı verin derim... ■

Vasiil Kadifeli (1959) İstanbul

Leterojn ni ricevis el geamikoj



Kiel mi Renkontis Esperanton?

Saluton el Turkujo!



Mi nomiĝas Fatih. Mi estas medicina studento, amanto de lingvolernado kaj lernemulo pri aliaj kulturoj kaj lingvoj.

En ĉi tiu mallonga skribaĵo, mi provos rakonti al vi kiel okazis mia eklernado de Esperanto.

Antaŭ unu kaj duono jaro, en reta lingvolernado platformo "Duolingo", mi vidis anoncon en angla lingvo: "Esperanto kurso venas!" Tiun nomon mi trovis strangan kaj pensis ke eble ĝi estis branĉo de la hispana(!). Sed tagoj pasis kaj post kiam mi plurfoje vidis tiun novaĵon mi decidis serĉi pri ĝi.

Mi guglis la vorton "Esperanto". Surklakis la retpaĝojn kiujn mi trovis kaj eklegis: "Esperanto estas artefarita lingvo, kiun kreis pola okulkuracisto L.L. Zamenhof. Ĝi estas facile lernebla kaj estas kreita por justa internacia komunikado."

Tiuj vortoj tre interesis min. Mi kontaktis turkajn esperantistojn kaj petis ilian helpon. Uzante komputilan programon kaj gramatikan libron mi iom post iom progresis en la lingvo. Poste mi legis romanojn, babilis voĉe kaj korespondis kun esperantistoj el diversaj landoj.

Tiel komencis mia aventuro. Mi ŝatas tiun lingvon kaj mi kredas ke ĝi enhavas grandan potencon kaj homarajn valorojn, kiuj estas akceptitaj de ĉiuj homoj kaj taŭgas por ĉiuj popoloj. Ĝi ne estas nur lingvo sed ankaŭ bona filozofio. La ideo de Zamenhof pri justa komunikado por ĉiuj homoj ankoraŭ ne realiĝis. Tamen la vivo daŭras, kaj la tero rondiras. Nur Dio scias kio okazos morgaŭ. Espereble la homaro pace

kunvivos.

Kun bondeziroj, via turka amiko,

Fatih Emre Can (1996) Elaziĝ



Saluton,

Kun granda ĝojo mi eksciis pri la publikado de via revuo la "Turka Stelo".

Mi laboras en Esperanto radio-programo en Melburno. Se vi volas scii pli pri tiu programo estas du eblecoj: la retejo de la radio www.3zzz.com.au (vi devas klaki sur la esperanta flago) aŭ la arkivoj de 3ZZZ esperanto-programo en la retejo de la Melburna Esperanto-Societo www.esperanto.com.au

Antaŭ kelkaj jaroj mi vizitis Istanbulon survoje al Ukrainujo, kiun mi atingis per ŝipo, sed mi ne provis renkonti esperantistojn. Nun mi scias ke mi eraris pensante, ke ne estas esperantistoj en tiu lando. Dum kongresoj, mi neniam renkontis iun el Turkujo.


Mi supozas ke perforto kontraŭ virinoj estas problemo, grava por vi ĉar vi mencias ke la 25-a de novembro estas la tago kontraŭ perforto al virinoj. Ankaŭ en nia lando, Australio okazas multe da kampanjoj pri tiu temo, ĉar bedaŭrinde interalie perforto en familio estas tro ofta.

Mi esperas havi la plezuron legi vian revuon regule.

Mi deziras al vi entuziasmon, energion kaj sukceson,

**Franciska Toubale
Aŭstralio**

Libro kritiko



Printempo en la aŭtuno de Julio Baghy

Printempo en la aŭtuno estas mia unua libro kiun mi legis en la Esperanto-Sumoo en julio de la jaro 2013. Ĝi estas libro pri tre romantika amo de gejunuloj. Julio Baghy priskribas ĉion tiel bele kaj per tia mola lingvo, ke la libro fariĝas leginda kaj legenda. Oni ne povas forlasi la libron el siaj manoj. La libro estas libere elŝutebla el la reto en la jena ligilo:

<http://egalite.hu/baghy/printempo.htm>

Laŭ mi la libro tre taŭgas por progresantoj.

Kritiko de William Auld pri la libro

"Printempo en la aŭtuno (1931) estas iasence malsimila al la ceteraj romanoj de Baghy. Ĝi estas simpla kaj sentimentala amrakonto inter studento kaj la filino de foira aŭguristo. Tio estas la unua amo, kaj Baghy traktas ĝin tre tenere. Ĝi estas kurioza miksaĵo de realeco kaj idealeco, sed konfesinde la aŭtoro kaptas la esencan emociaron de tiu universala, ĉiam ripetiga sperto."

fonto:OLE <http://esperanto.net/literaturo/roman/libr/printempautun.html>

Gravaj Tagoj



INTERNACIA TAGO DE LA GEPATRA LINGVO

La 21-a de februaro 2016

Diverseco lingva kaj kultura estas probable nia plej granda ŝanco por la futuro: por kreemo, novigo, inkluziveco. Ni ne malŝparu ĝin!

La internacia lingvo Esperanto respektas kaj subtenas lingvan kaj kulturen diversecon tra la mondo.

Pri lingvoj: www.lingvo.info

Pri interetna komunikado: www.esperanto.net, www.uea.org

Legu pli ĉe:

http://uea.org/vikio/21a_de_februaro_%E2%80%93_Internacia_Tago_de_la_Gepatra_Lingvo



Diller hakkında: www.lingvo.info Kavimler arası iletişim hakkında: www.esperanto.net | www.uea.org



Mia tombo

Mi ne scias, ĉu vi min kredas aŭ ne, sed mi havas mian tombon de kiam mi nur estis kvarmonata bebino. Mi ne estas faraono por kapabli konstruigi por mi piramidon aŭ riĉulino por antaŭprepari mian luksan maŭzoleon, sed fakte mi havas mian propran, veran tombon. Tamen ĝi estas malgranda, simpla kaj modesta. Mi povas malkovri al vi ties sekretojn: Ĝi lokiĝas antaŭ la ĉefa enirejo de la hanoja stacidomo, ĉe la strato Le Duan.

Klarigendas pri mia tiama familio-stato: antaŭ mia naskiĝo, miaj du pliaĝaj fratinoj unu post la alia forpasis je sia kvara monato. Iliaj forpasoj multege ĉagrenigis miajn gepatrojn. Terure, je mia kvara monato, serioza malsano minacis mian vivon (nun mi ne kapablas diri pri kiu malsano temis). Kiel kompatindaj estis miaj gepatroj, precipe mia patrino. Poste, kiam mi fariĝis plenkreskulino, ŝi kelkfoje rakontis al mi, ke ŝi imagis pri mia onta forpaso kaj dronadis sin en profundan malesperon. Certe, miaj gepatroj zorgeme provis min savi per aktiva kuracado, sed dum paniko, mia patrino sin kondukis laŭ popola kutimo: en tiaj cirkonstancoj, oni sin turnis al sorĉaĵo. Per naztuko, mia patrino plektis pupeton, metis ĝin en lignan skatoleton (ĉikaze en plumujon), klare enskribis mian plenan nomon, naskiĝtagon, eĉ mian morttagon por "trompi" la fantomojn! Poste ŝia plej fidela servisto sekrete "min" enterigis dum iu nokto antaŭ la hanoja stacidomo.

Ĝis nun, mi ne kapablas valortaksi ĉu la aktiva kuracado aŭ ĉu la sorĉaĵo min savis. Mi nur scias, ke mi estas ĉiam vivanta kaj havas mian tombeton. Ĉiufoje ke oni riparas aŭ renovigas la hanojan stacidomon, mi estas kortuŝita pri mia "kara tombo".

Karaj amikoj, ĉu vi volas viziti mian tombon? Estas malfacile por mi ĝin montri al vi ĉar mi mem ne konas ĝian precizan lokon.

Vi povus opinii, ke mia rakonto estas pura fantazio. Tamen, mi serioze juras al vi: ĝi estas vera! ■

Jada Valoraĵo - El la Verda Mesaĝo el Vjetnamio
http://e.vea.vn/view/1640_miatombo.htm



Stacidomo de Hanojo

Vortareto

tombo	mezaro
konstruigi	inŝa etmek
luksa	lüks
maŭzoleo	anito mezaro
propra	özel
modesta	mütevazî
sekreto	sır
enirejo	giriş
Hanojo	Vietnam'in başkenti Hanoi ŝehri
hanoja	Vietnam Hanoi ŝehrîne ait
stacidomo	tren istasyonu
klarigenda	açıklanması gereken
tiama	o zamanki
naskiĝo	doğum
forpasi	vefat etmek
ĉagrenigi	çaresizlik vermek
minaci	tehdit etmek
kapabli	muktedir olmak
temi	hakkında olmak
kompatinda	merhamete değer
precipe	özellikle
plenkreskulino	yetişkin kadın
imagis	hayal etmek
dronadi	(süreklî) boğulmak
profunda	derin
malespero	ümitsizlik
zorgeme	dikkatli şekilde
kuracado	(süreklî) tedavi
konduiti	davranmak
kutimo	gelenek
cirkonstanco	durum
sorĉaĵo	büyü
naztuko	burun mendili
plekti	örmek
ligna	aħşaptan olan
plumujon	dolmakalem kutusu
klare	net şekilde, açık
trompi	aldatmak
fantomo	hayalet
fidela	sadık
enterigi	gömmek
valortaksi	değer biçmek
ripari	tamir etmek
renovigi	restore etmek
kortuŝita	duygulanmış
preciza	kesin
juri	yemin etmek

Mallonga Historio de Filozofio (1)



Saluton,

Mi tute ne estas homo kiu legas verkojn pri filozofio, sed mi ŝatas scii almenaŭ iomete pri la historio de filozofio. Tio estas scii kiu pensis kaj kiamaniere li pensis kompreni la mondon tra nia historio. En la pasinteco mi legis la libron “La Mondo de Sofio” de Jostein Gaarder. La libro ŝajne estis por gejunuloj sed ĝi estis ankaŭ taŭga por kreskuloj. Se vi ne legis ĝin, mi sugestas, ke vi legu ĝin. Nuntempe mi legas la libron “Mallonga Historio de Filozofio” de Nigel Warburton.

Fakte tiuj libroj estas nur pri la okcidenta filozofio sur kiu la okcidenta civilizacio estis konstruita. Do ĝi eble ne apartenas al la tuta homaro sed ĝi ja estas grava kaj kovras la grandan parton de la homara pensmaniero. Plue “filozofio” en la greka lingvo signifas “amo pri saĝeco”, do filozofo demandas kaj provas respondi tiujn demandojn.

Legante la libron mi decidis fari rezumon de tio, kion mi legas kaj aperigi ĝin en nia revueto kiel serio de artikoloj. Ĉu mi povos kompreni la tuton de la libro kaj ĉu mi povos traduki ĝin sukcese? Pri tio mi ne certas. Kaj ĉu vi ankaŭ povos elstari kaj persisti kontraŭ mia amatora tradukaĵo? Ni tion vidos.

Do ni ekkomencu kaj vidu ĝis kiam ni ambaŭ eltenos la aferon... ■

Vasil Kadifeli (1959) İstanbul

Sokrato

Sokrato eble estas la unua folozofo en nia historio. Li estis malbela kaj stranga homo kiu vagadis en la urbo kaj demandadis homojn per strangaj demandoj. Li skribis nenion ĉar li kredis je la parola esprimo de pensoj kaj ĝia efiko. Ĉion pri Sokrato ni scias el la verkoj de Platono kaj ĉefe de lia verko “Dialogoj”. Platono fakte estis lernanto de Sokrato.

Sokrato ĉiam provis elprovi al la aliuloj, ke iliaj pensoj estis malpravaj. Li provis certigi ilin, ke tio, kion ili pensis scii fakte ne sciis. Li demandadis ilin per simplaj sed akraj demandoj kaj al iliaj demandoj li ĉiam respondis per pluaj demandoj. Lia ĉefa moto estis “Mi nur scias, ke mi nenion scias” kaj tion li volis ke la aliuloj sciu. Lia saĝeco baziĝis sur la fakto “scii la limojn de nia scio kaj tiel demandadi kaj malkovri, kial ni ekzistas en ĉi tiu mondo”. Tio fakte estas la alporksimiĝo al mondaj aferoj de la nuntempaj filozofoj dum ili laboras por provi kompreni la mondon.

En la tiama tempo oni pensis, ke li estis la plej grava “pensulo” sed li ankaŭ havis multajn malamikojn. Tiam en Ateno homoj sendis iliajn filojn al “sofistoj” kiuj estis alte pagataj profesoroj kaj instruis la arton de retoriko kaj filozofio. Sed ili, la lernantoj de sofistoj, ĉiam ĉirkaŭis Sokraton por aŭskulti lian instruadon kaj Sokrato neniam demandis monon por tio. Fakte li daŭre postulis, ke “li sciis nenion” do, kial li demandu monon?

Finfine oni akuzis lin per la persvado al siaj lernantoj kontraŭ religio. Dum lia juĝo li eĉ pli kolerigis la juĝistojn per liaj demandoj do li estis kondamnita al morto per veneno. Lia lasta leciono antaŭ ol li trinkis la veneon estis : “Mi preferas morti anstataŭ vivi kviete kaj sendemandante la mondon”.

(daŭrigota)

Leteroj el geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el esperantisaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri Esperanto kaj aliaj aferoj, siajn memorojn, eble reĉenzojn pri libroj ili jam legis ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La 9-a Mezorienta Kunveno



Al nia Kunveno kiu okazos inter la 1-a kaj 4-a de aprilo jam aliĝis 33 homoj kaj la programo de la prelegoj iom post iom bildiĝas. Ni ankaŭ decidis pri aldona AMO seminario (Aktivulo MaturiĝO) kaj ĝiaj programeroj ankaŭ aperis en nia retejo:

https://uea.org/vikio/La_naua_Mezorienta_Kunveno_en_Turkujo_en_2016

Turkujo	10
Irano	4
Kartvelujo	4
Germanujo	3
Britujo	1
Ĉinujo	1

Danlando	1
Grekujo	1
Hispanujo	1
Italujo	1
Japanujo	1
Kanado	1
Kroatujo	1
Nederlando	1
Svedujo	1
Svislando	1

La redaktado preskaŭ finiĝis ka la libron publikigos eldonejo Mondial.

NAZIM HIKMET RAN kaj liaj Poemoj



Renato Corsetti
Hirotaka Masaaki
Vasil Kadifeli

La laboro pri finpretigo de nia libro "Nazim Hikmet kaj Liaj Poemoj" daŭras. Ni ricevis senpagan permesilon por eldoni 250 ekzemplerojn. Ni ricevis ankaŭ du prologojn, unu de Prof. Gündüz Vassaf kaj la alia de Halil İbrahim Özcan kiu estas la vicprezidanto de la Internacia Turka PEN Asocio.

Poemo

Pri nia kor'...

Ni estu fieraj, fratoj
Pri nia kor',
Pri ĝiaj doloraj batoj!

Ĉar estas la bat' dolora
En nia kor'
Pro tuta la mond' senkora.

Nin mok' kaj malam' rigardas;
Sed nia kor'
Nur amon rebrilas, ardas.

En vintro de l' tempo nuna
Jen nia kor'!
Ĝi estas la brilo suna.

Frostiĝas nun sent' kaj larmo...
Sun': nia kor'
Vanluktas kun la malvarmo.

Sed venos, ho venos tempo
Por nia kor'!
Ni fidu je la printempo!

Kálmán Kalocsay


Ŝercoj!



Onklino demandas sian sep jaran nevon:

- Ĉu vi bone scias matematikon?
- Jes, onklino.
- Bone, se mi diros al vi, kiam mi naskiĝis, ĉu vi povas kalkuli kiom jar-aĝa mi estas?
- Ho, onklino! Tiel grandajn nombrojn ni ankoraŭ ne lernis en la lernejo!

Enigmoj



Ĉi tiu estas simpla kruĉvortenigmo. La celo estas malkovri kio estas la centra vorto kolorita grize. Por tio vi devas diveni lo vertikalaj vortoj kiuj estas sendependaj unu de la alia, sed kelkaj el ili povas esti inversaj. La vorto komenciĝas en la kvadrato kun la numero kaj la saĝetoj montras la direkton de la vorto. La solvo estas sube sed bonvolu unue provi solvi la enigmon vi mem.

1. Turni teksaĵon aŭ flekseblan objekton per ĝiaj ekstremoj en reciproke kontraŭaj direktoj
2. Cirkonstanca morfemo signifanta staton en malproksimo
3. Granda rabobirdo (Aquila k parencaj g-oj) el la familio de

akcipitredoj, kun kurba beko kaj akra vido

4. (inverse) Skribi ie mallongan resumon, por ne forgesi

5. Parto de la korpo de bestoj aŭ homoj, kuniganta la kapon kun la trunko

6. Granda dombesto, kies ino liveras lakton, kaj kies kastrita virseksulo estas uzata kiel jungbruto; kelkaj rasoj estas senkornaj


7. Kolora likvo por skribi, presi aŭ desegni

8. Perdinta sian naturan ruĝetan koloron, blanketa

9. Prep., signifanta «koncerne al, rilate al, teme de»

10. Terpeco, ordinare apuda al domo, kaj uzata por kultivado de florplantoj, de frukt-arboj kaj -arbustoj, de legomoj aŭ de gazonoj

11. Mallongigo de Unuiĝintaj Nacioj



La 101-a UK en Nitra

<http://www.nitra2016.sk/>



UK 2016

101-a Universala Kongreso de Esperanto en Nitra (Slovakio)

La loka kongresa komitato konsistas el:



Peter Baláž

Prezidanto de la LKK



Juraj Gondžúr

Loĝiga servo



Zlatica Gregorová

Ĵurnalistaj rilatoj



Zuzana Kožuchová

Publikaj rilatoj



Stano Marček

Kultura programo



Zuzana Pichnarčíková

Ekskursoj



101-a Universala Kongreso de
ESPERANTO
23.-30.07.2016 Nitra, Slovakio

Esperanto

Mi ŝatas lerni lingvojn ĉar mia plej ŝatata hobbio estas ekkoni novajn kulturojn. Mi havis la ŝancon ekkoni du diversajn kulturojn antaŭ du jarojn dank' al mia lernejo.

La unua estis la kulturo de Francujo. La franca lingvo ne estas tiel profunde enradikiĝita paroli al personoj de ĉiuj naciecoj. Sed la alia, vere ŝokis min! Ĝi vere havas grandan kulturon kaj bibliotekon. La parolantoj de tiu lingvo havas bonan kontakton inter si. Oni jam celebris la 125-an datrevenon de tiu lingvo pasintan jaron.

Ĝi nomiĝas Esperanto. Ĝi estas kreita de doktoro Ludwig L. Zamenhof, pola kuracisto, kiu eldonis kaj publikigis ĝin en 1887. De tiam, Esperanto estis lernata de milionoj. Estis multaj projektoj kaj proponoj por internacia lingvo dum jarcentoj sed Esperanto estis la nura kiu restis parolata en la tuta mondo, kaj la nombro de parolantoj kreskas senĉese. Multaj internaciaj kunvenoj okazas tra la tuta mondo en Esperanto. Libroj kaj revuoj estas eldonataj de la miloj por kontentigi la petojn de internacia publiko. Eĉ la plej grandaj internaciaj firmaoj faras reklamojn uzante Esperanton. Hoteloj, restoracioj kaj turismo konkurencas por la patroneco de la Esperanto-parolanta vojaĝanto.

Esperanto estas facila... Esperanto estas multe pli facile lernebla ol iu ajn alia lingvo. Fakte, ĝi estas lernebla proksimume en kvarono de la tempo necesa por lerni iun ajn lingvon! La ortografio estas facila: ĉiu litero havas akurate unu sonon. La prononco estas facila, kaj la akcento estas ĉiam sur la antaŭ-lasto silabo. La gramatiko estas facila: ekzistas nur dek ses reguloj sen esceptoj. Tiu signifas, ekzemple, ke ekzistas neniam malregulaj verboj. La vortprovizo estas facila: multaj internaciaj vortoj estas uzataj, kiel telefono, biologio kaj matematiko. Esperanto donas tre "maturan" impreson en parolata aŭ skribita uzo, kaj pro ĝia alta proporcio de vokaloj al konsonantoj, oni ofte diras ke ĝi similas al la hispana aŭ la itala.

